# *Prezentas Kubo en UN projekton de rezolucio kontra? la usona blokado.*




Havano, 31 okt (RHK) La ?enerala Asembleo de UN pritraktas hodia? por la 27-a fojo sinsekve la projekton de rezolucio kiu postulas ?esigi la ekonomian, komercan kaj financan blokadon altrudatan de Usono al Kubo dum preska? ses jardekoj, ?i-foje sub premoj de Usono kiuj celas bari la procezon.

La? klarigis la kuba ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez, la usona delegitaro prezentis 8 amendojn kiuj celas prokrasti la vo?donadon kaj malfaciligi la aprobon de la rezolucio, la? raportas la informagentejo Prensa Latina.

Rodríguez, denuncis novajn manovrojn usonaj, kiu ser?as aliancitojn por ne subteni la projekton de rezolucio de la kariba insulo kontra? la usona sie?o.

La rezolucio tekstas: Bezono ?esigi la ekonomian, komercan kaj financan blokadon de Usono kontra? Kubo; ?i estos prezentita ?i- 31-an de oktobro en UN.

La kuba ministro emfazis ke Usono ne havas moralon por paroli pri homaj rajtoj. Li aldonis ke estas devo de kiu ajn diplomato  “defendi la veron(…) malebligi ke estu perfortataj la procedurojn kaj ke estu atakataj suverenaj ?tatoj.”

Rodríguez emfazis ke tiu ?i estas “manovro propagandcela (…) por manipuli la publikan opinion”.

Li memorigis ke la 7-an de novembro de 2006, Washington anka? klopodis amendi la kuban rezolucion, tamen, mocio pri ne agado ricevis solidan subtenon de 126 membro-?tatoj kiuj favoris Kubon.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/175317-prezentas-kubo-en-un-projekton-de-rezolucio-kontrau-la-usona-blokado

**Radio Habana Cuba**